



**Numero 2024:19; majo 10.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo LAPA KB 533. Sume 833 KB

## **Afrikaj junuloj subtenataj de TEJO**

Fine de aprilo okazis Retoso, la reta kongreso de TEJO. Post la unua eldono, okazinta en 2021, ĝi iĝis tradicio en Esperantujo kaj nemalhavebla spaco por interŝanĝo de spertoj por junaj movadanoj, sopirata de tiuj al kiuj malfacilas partopreni en ĉeestaj aranĝoj kaj kiuj soifas lerni, ridi kaj ludi kun samideanoj el la tuta mondo.

La partopreno en Retoso estas senpaga. Ĉiuj homoj, sendepende de aĝo aŭ membreco en TEJO aŭ UEA estas bonvenigitaj. La [aliĝilo troviĝas ĉi tie](#). Pri la [programo](#) menciindas [diskutrondo inter adoleskaj esperantistoj kaj patronoj pri la estonteco de la junulara movado](#), kie oni esperas realigi valoran intergeneracian transdonadon de konoj, perspektivoj kaj spertoj.

Ĉi-jare oni lanĉas kadre de ĝi donackampanjon por subteni la vojaĝigon de afrikaj junuloj al la 109-a UK en Aruŝo. Por instigi la kunlaboremon de samideanoj, la organiza teamo elektis du junajn artistojn speciale ligitajn al Afriko, Clarissa Sabatini kaj Jonny M, kies prezentaĵoj estos spekteblaj per la [YouTube-kanalo de TEJO](#). UEA kaj TEJO invitas esperantistojn fari donacojn per UEA-konto, *PayPal* aŭ ĝiro, kun la referenco *UK en Afriko*, laŭeble antaŭ la fino de majo por efike plani la subtenon. Kaze de demandoj bonvolu skribi al [kasisto@tejo.org](mailto:kasisto@tejo.org). UEA-konto: tejo-I

Koncizigita el *Gazetara Komunikado de UEA*

**SMG:** Lige kun tio, UEA anoncas, ke en Aruŝa okazos Infana Kongreseto.

## **Sŭahila gramatiko en la Libroservo de UEA**

**Baza sŭahila gramatiko, Nino Vessella, 2024.** Enkonduko en unu el la ĉefaj lingvoj de Afriko. Eldonita por tiuj kiuj partoprenos la 109-an UK en Aruŝo, Tanzanio. Prezo: € 10,80. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <https://katalogo.uea.org?inf=2100>

## **Malĝojigo uzbeka**

Ni ricevis malĝojan informon de IKEF, ke la prezidanto de IKEF en Uzbekio Gafur Mirzabajev forpasis. Tion raportas *La Ondo de Esperanto*. <https://sezonoj.ru/2024/04/mirzabajev/> Mi falis en profundan malĝojon kaj fenebro. Mi havis intiman amikecon pli ol 30-jaran kun Gafur kaj liaj familianoj. Komence de la kuranta jaro li ankaŭ skribis al mi, ke li kun sia filo Umit planas vojaĝi al nia urbo Siano por komerca projekto, kvankam li jam vizitis ĝin kelkfoje. Tamen la lastan monaton li ne respondis miajn mesaĝojn. Kiel la IKEF-prezidanto mi donas al li

profundan funebron kaj al liaj filo Umit kaj familianoj simpatiantan kondolencon!  
Gafur Mirzabajev (1956-2024) estis fervora esperantisto kiel prezidanto de Uzbekia Esperanto-Asocio kaj Uzbekia filio de IKEF, kaj entuziasma utiliganto de Esperanto por literaturo, kanto, televido, komerco kaj turismo.

Prezidanto de IKEF. Ĉielismo WANG Tianyi, <http://ikef.info>

## Krakova invito majofine

De la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 2024, okazos evento organizita de krakova esperantistaro: <https://eventaservo.org/e/etagoj2024>. Estas planitaj prelegoj kun lumbildoj, koncertoj kaj aliaj programeroj, kaj dimanĉe tuttaga ekskurso ekster Krakovo. La nombro de ekskursanoj estas limigita, do bonvolu aliĝi frue.

Krakova Societo ESPERANTO

## Nova universitata sukceso en nefacilaj cirkonstancoj

En *Lesja Ukrainka Volinia* nacia universitato en la urbo Lucjk (okcidenta Ukrainio) mi kun mia koleginino profesorino Oksana Rohach sukcesis organizi elekteblan kurson pri Interlingvistiko por studentoj de la kvara studjaro (proksimume 20 studentoj). Kadre de la kurso laŭ ilia peto ni prezentis malgrandan E-kurson por komencantoj. Estas bona grupo de studentoj, kiuj studas la anglan kaj la germanan lingvojn kaj havos fakon pri aplikata lingvistiko. La 16-an de majo ni volas organizi retan renkontiĝon kun esperantistoj el diversaj landoj por ke niaj komencantoj povu starigi kontaktojn. Mi esperas, ke vi kaj universitataj studentoj el viaj landoj aŭjunularaj kluboj povus partopreni kaj subteni la iniciaton. Laŭ bezono mi interpretos. La renkontiĝo okazos la 16-an de majo je la 20:00 (UTC+3). SMG ne aperigas la alirajn instrukciojn pro la risko de misuzo. Por akiri ilin, skribu al Nina aŭ SMG.

Nina Danylyuk

## Legantoj de la mondo, unuiĝu!

La 12-an de majo, komenciĝos la 87-a Internacia Esperanto-Sumoo. Dum du semajnoj ni, la partoprenantoj, ĉiun tagon legos la libron, kiun ni elektis, kaj la kvanton da paĝoj, kiun ni mem decidis, kun 300 esperantistoj tra la mondo. En la solidara sento ni povas ĝui legadon de Esperanto-libroj. Tiu sumoo estas la plej granda leg-movado en la homa historio, danke al Esperanto kaj interreto. Mi atendas vian partoprenon. Pli detale vizitu nian retejon: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

HORI Jasuo, Japanio, <[horizonto@r.water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@r.water.sannet.ne.jp)>

## Pri la enhavo de IPR 2024/2 (Jarkolekto 54)

- Enkonduko: (Ahmad Reza Mamduhi) p.3
- Duncan Charters: Kial kaj kiel krei interkulturan gvidilon por la UK en Tanzanio p.4 (SMG valora, ampleksa artikolo)
- Renato Corsetti: Lingvoj en Afriko: la progreso de frenezo; p.9
- Radojica Petroviĉ: Strukturo kaj fizionomio de la Eo-komunumo; p.13
- Mireille Grosjean (MG): 2024 - Jaro de Edukado; p.17
- Alessandra Madella: *Teo, Amo kaj la Mondo* atingis Italion; p.19
- MG: Pri la diferenco inter reta kontakto kaj rekta kontakto; p.22

- El la landoj kaj sekcioj (BG, DE, ES, MG, SN, RS); p.23
- Renato Corsetti: Ĉu afrikanoj parolas afrikajn lingvojn?; p.32
- Notlibre (Katalin Kováts, Stefan MacGill pri AMO kaj <Landa Parad'>); p.34
- Alessandra Madella: Intervjuo al *Esperanta Ponto* ; p.36
- Informoj pri ILEI, redakciaj informoj; p.37

## Stipendikonkurso por partopreni en la 57-a ILEI-kongreso

Nia instruista ligo stipendios dek partoprenantojn de la ILEI-kongreso, kiu okazos en Maceió, Brazilo, de la 20-a ĝis la 27-a de julio. La kongreso de ILEI celas plibonigi vian lingvokonon kaj didaktikon. La stipendio kovras restadkostojn (loĝado en gastejo proponita de la LKK) kaj maksimume € 150 de vojaĝkosto. Stipendiatoj mem pagas la bazan kotizon de aliĝo laŭ la unua periodo. La kondiĉoj por gajni stipendion:

- Ĝisnuna kontribuo al lingva edukado kaj interkultura interŝanĝo
- Sindevigo plu aktivi en la organizo
- Sindevigo al plentempa partopreno en la kongreso

Vi povas aliĝi al la kongreso ankaŭ sen la stipendio kaj mem pagi la kostojn..

Por peti la stipendion, nepras plenigi La Aliĝilon en la paĝo [2024.kongreso.org](https://forms.gle/Lis6xQURiW3zSMvx7) kaj La Stipendipetilon: <https://forms.gle/Lis6xQURiW3zSMvx7>

Limdato por la stipendipeto estas la **31-a de majo 2024**.

Se vi havas demandojn, skribu al: [ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com), kopie al [laura.brazzabeni@gmail.com](mailto:laura.brazzabeni@gmail.com)

## Terminologo bezonata ene de UEA

UEA ricevis inviton partopreni la ĝeneralan asembleon de Infoterm (IGA), okazontan la 10-an de majo. La Estraro de UEA pri tio kunlaboras kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Tiel UEA estos reprezentanta en la IGA pere de prof. Gledhill. La antaŭa komisiito de UEA pri Terminologio, Melanie Maradan, disponigis al li informojn kaj konsilojn surbaze de sia antaŭa agado.

Interesatoj pri la kampo estas petataj kontakti Mark Fettes en lia funkcio de CED-direktoro. Efektive unu el la esplorkampoj de CED estas terminologio:

<https://interlingvistiko.net/terminologio/>

Menciindas ankaŭ, ke la Akademio de Esperanto havas sekcion pri faka vortaro, kiu povus helpi. Dume UEA serĉas novan komisiiton pri terminologio. Se vi interesiĝas, ne hezitu kontakti la Estraron de UEA aŭ la Ĝeneralan Direktoron.

Aleks Kadar, ĝenerala sekretario de UEA

## Baltio: BET en 2024 kaj 2025

Laŭvice, la Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2024 okazos en Tartu, Estonio. **BET-58** okazos de la 10-a ĝis la 14-a de julio 2024. Informoj aperos en la koment-fadeno sub <https://www.facebook.com/.../1053.../posts/10159707761690017>

kaj en la FB-grupo <https://www.facebook.com/groups/105354750016>

Ekfunkcias jam retejo de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos la de la 5-a ĝis la 13-a de julio, 2025 en Kaunas <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=bet59> Tie



estas bazaj informoj. Konkretaj informoj estos en la informa bulteno pri BET-59 aperonta fine de majo. En la retejo de BET-59 konstante aperos informoj pri evoluo de la organizado de la aranĝo. Jam nun Vi povas plani vian partoprenon.

Povilas JEGOROVAS

## <Landa Parad'> por 2024 ekaperis

Ĉi tiu serio de dokumentoj prezentas ampleksajn informojn pri la landoj de la mondo, sub la motivo, ke por progresi ni devas scii nian nunan staton. La dokumentojn subtenas ILEI, IFEF kaj IKEF. La unua regiono estas 'Pacifiko' (AU, NZ, CA, MX kaj US). Laŭdinde, el ĉiu lando venis aktualaj informoj. Ni alkroĉas la sveltigitan dokumenton (533 KB).

## EKO-komunikoj estas indeksitaj!

En la retejo de ILEI jam aperis indekso de la dek unuaj komunikoj. Trovu tion ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>. Krome, vi povas tie aliri ĉiujn komunikojn de 2023 plus la aperintajn el 2024.

===== vortoj: 1290 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La unuaj dek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@<e>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.